

# la lampiro



Intervjuo  
kun Tânia Paixão

# Quer aprender Esperanto?



[pma.esperanto.org.br](http://pma.esperanto.org.br)

# Enhavo

- 4 | Vortoj de la redaktanto  
Apoginda evento
- 5 | Movade  
Ĉu ĉeestaj kongresoj gravas?
- 6 | Kino kaj aliaj artoj  
Ene
- 8 | Ne plu inter ni  
Du novaj steloj instaliĝis en nian  
verdan firmamenton
- 11 | Ni iom ridu  
Terura sperto
- 12 | Iom da Filozofio  
Surstrata dialogo kun Sokrato
- 13 | Recenze  
Falafla en maco
- 15 | Iom da Gramatiko  
Lingvaj Respondoj
- 16 | Iom da poezio  
Zamenhofa balado
- 18 | Intervjue  
Kurema esperantistino:  
Tânia Paixão
- 20 | El mia vidpunkto  
Krea Novigo: La Futuro de  
Tutmonda Mondvizio kaj Etiko
- 22 | Por iom mediti  
Rutino

**Kovrilbildo:** Tânia Paixão ludanta la rolon de la vagabondo Charlie Chaplin okaze de surstrata kampanjo por diskonigo de Esperanto en Rio-de-Janeiro oktobro 2013.

la lampiro

65-a jaro n-ro 187 2024:3

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sergio Viana  
(psviana@terra.com.br)

**Enpaĝigo:** José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas  
pri la subskribitaj artikoloj*



## Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo A. Alencar de Lima  
**Vicprezidantino:** Cristina de Claudia Graaf  
**Sekretariino:** Maria Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** José R. Tenorio da Silvas

### Konsilantaro

Paulo Sergio Viana  
José Mauro Progiante

### Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

## Jarkotizo por 2024

<b>Simpla Membro</b> .....	R\$ 200,00
<b>Subtena Membro</b> .....	R\$ 400,00
<b>Ŝtatinterna Membro</b> .....	R\$ 100,00



## Apoginda evento

Alproksimiĝas nia kongreso de EASP. Ĝi okazos en Paulínia/SP, en septembro 2024. Ĉu vi jam enskribiĝis?

La ĉefa motoro en la organizado de nia grava jara evento estas la kompetenta, serioza kaj sperta samideano James Piton. Li fervore laboras kaj pretigas altnivelan kunvenon.

La urbo estas alloga, la programo estos riĉa, la aranĝoj estos laŭeble konvenaj al la partoprenantoj.

La Estraro laboras, informadas kaj varbadas, por ke ni havu ĉi-jare sukcesan, viglan, imponan kongreson.

La Estraro nepre plenumas sian parton. Ĉu vi apogos? Ĉu vi ĉeestos?

# Paulínia atendas vin!

14 -15 setembro 2024



Realização



Esperanto Associação de São Paulo

Apoio



Município de Paulínia

## Ĉu ĉeestaj kongresoj gravas?

En ĉi tiu jaro 2024, brazilanoj havas antaŭ si belan sortimenton de kongresoj en sia lando. Kongreso de ILEI en julio, kongreso de EASP en septembro, Brazila Kongreso en novembro. Ĉu ne bela serio? Ĉu ne signifoplena indiko pri la vigleco de nia movado?

Sendube, ili estas bonaŭgura sinsekvo de gravaj Esperanto-eventoj.

Tamen, ĉu ni ĉiuj, brazilanoj kaj nebrazilanoj (precipe en Ameriko) konscias pri la graveco de tiuj eventoj? Ĉu ni ankoraŭ emas apogi tiajn grandajn ĉeestajn kunvenojn? Aŭ eventuale

ni nuntempe emas akomodiĝi antaŭ la komputila ekrano kaj paroli al la mondo de malproksime?

La vera demando estas: ĉu ĉeestaj kunsidoj influas la evoluon de la movado por Internacia Lingvo? Aŭ la mondo resumiĝas je interreto?

Mi pensas, ke la respondo estas evidenta: ambaŭ rimedoj estas gravaj por nia afero. Sed ni ne faru la eraron konsideri, ke manpremoj, brakumoj kaj festado en fizika maniero perdis sian signifon.

Ni apogu niajn eventojn!

## Ene

*Originala titolo: Inside*

*Reĝisoro : Vasilis Katsoupis*

*Geaktorj: Willem Dafoe, Gene Bevoets  
kaj Elyza Stuyck*

*Tipo: Dramo kaj Suspenso*

*Lando: Usono*

*Lanĉo: 10.03.2023*

*Tempo: 1h45min*

Ĉi-foje mi parolos pri filmo kiu multe impresis min je ĉiuj aspektoj kaj kiu aldone temas pri arto. Temas pri filmo kiu nomiĝas “Ene” kun Willem Dafoe. Mi nepre atentigu vin ke tiu filmo estas peza, ĝi ne estas taŭga por ĉiuj aĝoj, kaj ja ne estas por spekti en ajna momento. Vi nepre devas spekti ĝin kiam vi estas malfermaj sperti sufiĉe da anima tensio kaj streĉo.

La historio simplas. Nemo, la ĉefa rolulo en la filmo, estas homo kiu montriĝas ege interesita pri arto dum granda parto de sia vivo, kaj fine spertiĝas pri ŝtelado de artaĵoj. Tial, li



estas vokata por ŝteli ion en luksa apartamento, sed li iĝas enfermita tie. La filmo temas pri kiel li reagis al tiu situacio. Do, kiel vi povas imagi, ĉiuj scenoj temoj pri li en tiu spaco. Kio donas tre interesan etoson al la filmo, ĉefe se oni rimarkas ke ĉiuj artaĵoj estis specife elektitaj por komponi la apartamenton.

La scenoj, la aktorado, ĉio brilas en la filmo. Tiu situacio estas vere ekstrema, kaj la spektanto ade demandas

sin pri kia estus lia propra reago en la sama situacio. Estas trafokule vidi kiel influas la manko de socia rilato, nutraĵoj kaj taŭga etoso por vivi. Se lasi tiun malbonan parton aparte, estas interese vidi kiel Nemo, malgraŭ la malbona situacio, provas fari arton el tio ĉio. Ni vidas liajn klopodojn por eliri kaj ankaŭ provon por minimuma emocia komforto en pluraj partoj, eĉ se jam tre for de realeco.

Kaj la fino de la filmo estas ekzakte kia ĝi devas esti por tia filmo. Sufiĉe

duba kaj nuba, kio donas multege da spaco por ke la spektanto imagu kaj pripensu ĝin. Mi ne volas multe pli malkaŝi pri la filmo. Kiel ĉiam mia celo estas diri sufiĉe por instigi vin ankaŭ spekti.

Tiu filmo troveblas ĉe Amazon Prime. Ĉu vi pretas akompani tion kio okazas Ene kun Nemo? Mi esperas ke vi interesiĝos spekti tiun instigan filmon. Bonan spektadon! Ĝis la sekva filmo.!

**Anna Lobo de Carvalho**

Por pliaj informoj iru al: <https://esperanto.org.br/kongreso>

58º CONGRESSO BRASILEIRO DE  
**ESPERANTO**  
14 A 17 DE NOVEMBRO DE 2024 • SALVADOR, BAHIA





## Du novaj steloj instaligis en nian verdan firmamenton

Tio montriĝis unu el la koincidoj por kiuj oni neniam estas vere preta. Post tri jardekoj de poresperanta kunagado en Campinas-SP, koincido mizere trafis nin. En la sama tago, la 20-an de majo, pro malsamaj kialoj mortis grandaj esperantistoj kaj niaj amikoj. Pro preskaŭ fulma malsano, post nur kelkaj tagoj forpasis multjara urba delegito de UEA, Prof-ro D-ro David Bianchini, 69-jara, mia unua Esperanto-instruisto. Vespere, post longa kaj bedaŭrinde suferiga malsano, forpasis Prof-ro D-ro José Joaquín Lunazzi, 75-jara esperantisto.

Ambaŭ semantoj de Esperanto estis agantoj en KCE-Campinas (Kultura Centro de Esperanto, nun: CEE Cultura Esperanto e Ecobrinquedoteca), ambaŭ estis universitataj esploristoj, ambaŭ estis profesoroj, ambaŭ amikoj de multaj esperantistoj en Brazilo kaj tra la mondo. Eĉ en siaj agadoj ili plenumis similajn servojn al Esper-



David Bianchini (1955-2024)

anto. Lunazzi okazigis oficialan, poentodonan kurson de la lingvo en Unicamp, Ŝtata Universitato de Campinas (la dua plej bona en Brazilo laŭ QS World University Rankings 2024), kaj David same faris ĉe la prestiĝa PUCP-Pontifika Katolika Universitato de Campinas, kie li dum kelkaj jaroj kunordigis la kurson pri Elektra Inĝenierarto kaj estis direktoro pri tiu sama Fakultato.



Kiam tia esperantisto foriras, mi ĉiam pensas kiom da tempo necesos por ke troviĝu simile sindonema idealisto kaj talentulo. Tiam ni renkontas junajn esperantistojn, kiuj rekte aŭ nerekte danke al niaj antaŭuloj, jam "fosas sian sulkon" kaj tio donas la esperon, ke nia Movado plu moviĝos.

\*\*\*


David Bianchini naskiĝis en 1955, en Assis-SP. Diplomita inĝeniero pri telekomunikado (1979), li estis profunda humanisto. Tion atestas lia kariero mem. Post 20-jara sukcesa kariero en Telekomunikado kun postdiplomigo pri Administrado, li magistriĝis kaj poste doktoriĝis pri Edukado; iom poste, li fariĝis specialisto pri Psikanalizo. En PUCC li prezidis la universitatan komitaton pri Etiko en la Scienca Esplorado kun Homoj. En Unicamp li kunlaboris pri la temo Inteligentaj Urboj kaj 5G-Teknologio (libron pri tiu temo li verkis en Esperanto kune kun Ladislau Afonso, PUC-Poços de Caldas). Li estis tre aktiva en la Spiritisma Movado, kiel preleganto kaj prezidanto de USE-Campinas.

Kiel mezlernejano li eklernis Esperanton en São Caetano do Sul, SP, danke al la dentkuracisto kaj veterana esperantisto Arnaldo Vianna. Bazan

kurson li unuafoje gvidis en 1975 ĉe Studenta Centro de "Lernejo pri Inĝenierarto Mauá". En 1984 li translokiĝis al Campinas, kie li kunfondis Kulturen Centron de Esperanto en 1986. Tra la jardekoj li daŭre diskonigis la lingvon en prelegoj, en la gazetaro kaj en kursoj. La 9-an de majo, nur kelkajn tagojn antaŭ la forpaso, li partoprenis retan intervjuon pri siaj du movadoj. Lia amo al Esperanto reprezentigis per E-flago kiu kovris la ĉerkon. Laŭ peto de lia vidvino kaj gefiloj, la flago akompanis lin en la ĉerko mem al la tombo.

\*\*\*

Lunazzi naskiĝis en Argentino en 1948, en la urbo La Plata, ĉefurbo de la provinco Buenos Aires. Li tie diplomigis kaj doktoriĝis pri Fiziko. En 1975 li estis invitita labori en la nova



José Joaquim Lunazzi (1948-2024). Foto: Antoninho Perri, el *Jornal da Unicamp* n-ro 565, Julio 2013

Instituto pri Fiziko de Unicamp, kie li kunfondis laboratorion pri Optiko. Li jam havis tre bonan reputacion kiel juna esploristo, ĉar Lunazzi plejeble estis inter la plej unuaj, se ne la unua, kiu produktis holografiaĵon<sup>(\*)</sup> en Latinameriko. Li konstatis, ke holografio kaj fotografio ne estas tre malproksimaj teknikoj kiel oni supozis. Li eksperimentis per difrakta ekrano kaj reproduktis bildojn kodigitajn per difrakto, tiel ke tridimensiaj bildoj povis reproduktiĝi sen specialaj aparatoj. Kun tio li alvenis al la fundamentaj rimedoj, kiuj ebligas tridimensian televidon sen okulvitroj.

Li estis tiel entuziasma pri transdonado de scioj, ke li ignoris la rajton emeritiĝi en 2002 kaj plu laboris en la universitato por altiri al la scienco mezlernejajn lernantojn kaj por klerigi siajn studentojn. Li kungvidis la brazilan delegacion al la 24-a Iberoamerika Olimpiado pri Fiziko en la mezamerika lando Salvadoro, 2019, kiam ĉiuj par-

toprenintaj brazilaj studentoj atingis oran medalon.

Lunazzi en siaj laborvojaĝoj havis la okazon viziti esperantistojn en aliaj landoj. Li plurfoje prelegis en Esperanto pri siaj fakaj scioj. Li estis kunordiganto de koresponda kurso de Esperanto por portugallingvanoj (CER), kiu pionire funkciis en la fino de la 1990-aj jaroj, per retpoŝto. Centoj da brazilanoj ekhavis kontakton kun la lingvo danke al Lunazzi kaj lia reto de volontulaj korektantoj. Li kunordigis Esperanto-rondon de studentoj en Unicamp, kiu vidis la aperon de pluraj junaj aktivuloj.

## James Rezende Piton

(Paulínia-SP)

---

(\*) holografio - fotografia procezo, kiu per du fontoj de laser-radioj registras bildon, kiu aspektas tridimensia sen la uzo de specialaj aparatoj por la spektanto. Tion oni pli bone vidas en loko kun malforta lumo.

Papere **rehaveblaj**  
en la libroservo  
de EASP!



# terura sperto

(surbaze de la Fundamento)

Mi vidis leonon! Dio sankta!

Fakte jen bela, sovaĝa besto.

Danĝera, sed tre bela!

Estas granda la plezuro kiam oni povas vidi tiujn imponajn, sovaĝajn bestojn...

Jes, mi vidis leonon kaj mi ne timis.

Tamen...

Tamen mi konstatis, ke... la leono vidis min!

Ho tio ne gravas, ĉar ĝi estas malproksime.

Atendu iomete... ĉu la leono vidis min?! Mi estas perdita!

Terura angoro ekposedas min.

La kruroj ne obeas plu, la voĉo ne eliras el la gorgo, la penso tute baraktas.

Ĝi blekas. Mi tremas.

Ĝi kuras. Mi kriegas!

Helpon! Helpon! Helpu min, Dio mia!

— Hej, kara, vekigu!

— Kie estas ĝi? Kie?

— Ĝi?! Ĝi, kiu? Ĉu ia fantomo vin persekutis?

— Multe pli terura ol fantomo, frato mia. Mi vidis leonon kaj ĝi kuradis por kapti min. Mi estas tremanta ĝis nun!

— Mi jam konsilis al vi ne manĝi viandon antaŭ dormi... sed vi ne aŭdas min...

**Dirce Sales**





## Imaga interparolo kun filozofoj

### SURSTRATA DIALOGO KUN SOKRATO (5-a jarcento a.K.)

— S-ro Sokrato, mi serĉis vin en via hejmo, tamen via edzino Ksantipo diris, ke ĉiam estas pli facile trovi vin surstrate. Ŝajne ŝi pravis. Kaj kiam mi demandis, kiel rekoni vin, ŝi respondis: li estas la plej malbela viro. Pardonu mian ŝercemon, sed ŝajne ŝi pravis ankaŭ pri tio.

— Mi fajfas pri tio, kara junulo, ja mi estas malbela. Feliĉe tio ne fortimigas la homojn kaj multaj akceptas interparoli kun mi pri pluraj temoj: kuraĝo, justeco, amikeco ktp.

— Ĝuste pri tiu via kutimo mi interesiĝas. Parolu al mi iom pri tio, kion oni nomas majeŭtiko aŭ akuŝo de ideoj. Ĉu vi iel inspiriĝis el la fakto, ke via patrino estis akuŝistino?

— Eble. Graveda virino scias, ke en ŝia ventro vivas estulo, sed nur post la akuŝo ŝi vidas, kia ĝi estas; nur tiam ŝi vere konas la filon. Mi uzas majeŭtikon por ke homoj elpuŝu el si ideojn, konkludojn, sciojn, juĝojn, interne

disvolviĝantajn, sed ankoraŭ ne plene komprenatajn. Akuŝistinoj, kiel mia patrino, helpas al naskiĝo de bebo, sed la patrino devas fortostreĉi kaj suferi, por ke la akuŝo okazu. Mi faras mian parton, sed miaj interparolantoj trovas la veron nur se ili akceptas la defion prikonsideri la multegon da demandoj, kiujn mi prezentas al ili.

— Kompreneble... La filozofoj, kiuj vivis antaŭ ol vi, okupiĝis precipe pri kosmologio, pri la origino de la mondo kaj de la vivo. Vi estas la unua, kiu preferas enketi, ol pensi pri tiuj temoj.

— Mi opinias, ke estas grave filozofii pri la origino de ĉio, kiel faris miaj antaŭuloj. Tamen, fakte mia plej granda intereso estas dialogi kun homoj pri etiko, moralo, memkono. Mia plezuro estas interparoli pri virtoj kaj fine rimarki, ke mia interparolanto malkovris en si mem ion, kio helpas lin esti pli virta.

*(Daŭrigota sur la paĝo 14)*


# Falaflo en maco

Aŭtoro: Sten Johansson

Eldono: Mondial, 2023

“Falaflo” estas manĝaĵo ofta en Mezoriantaj landoj; “maco” estas bulo el nefermentigita pasto, tradicia inter hebreoj. Ĉi tiu originala romano havas kiel fonan rakonton, la vivon de jud-devena sveda junulino kaj ŝia palestina koramiko, en Svedujo. Ĉio okazas en iu malstabila politika momento de la mondo, en la 20-a jarcento. La celo estas klara: la homa krueleco, diskriminaciemo, maltoleremo kaj perfortado je la nomo de etnaj diferencoj estas tragika sinsekvo en la historio de tiu jarcento.

La avo de la junulino priskribas la suferegon de judoj sub la holokaŭsto, el kiu li preskaŭ mirakle sukcesis el-saviĝi. Siavice, la familianoj de la palestinano rakontas la teruraĵojn, kiujn ili trapasis por fuĝi el sia lando, meze de danĝeregoj kaj doloroj, por rifuĝi en Eŭropo. La teroro inter israelanoj kaj palestinanoj, kun amasa



buĉado de civiluloj, estas kroma elmontro de tia malsano, kiu starigas homojn kontraŭ homoj.

Rifuĝantoj submetitaj al riska krozado tra Mediteranea Maro kaj aliaj akvoj, kaŭzas hororon al la rigardo. La fama foto de droninta knabeto sur la sablo de Eŭropa plaĝo ŝokas la mondon, ĝis hodiaŭ.

(Daŭrigota sekvapaĝe)

## Daŭrigo de la paĝo 12: Iom da Filozofio

— Vi havas intereseĝajn ideojn. Kial ne verki pri ili?

— Kiel vi scias, mi preferas disvastigi miajn pensojn voĉe. Mi kredas, ke tio efikas pli, ol skribaĵoj. Malmultaj ŝatas legi. Krome, du el miaj disĉiploj, Platono kaj Ksenofono, kutimas preni notojn pri miaj dialogoj. Probable ili antaŭenigos miajn ideojn.

— Certe ili faros tion. Viaj ideoj transiros la jarcentojn... Por fini, S-ro

Sokrato, kvankam mi scias, ke al vi plaĉas multe paroli, mi petas, ke vi respondu per du frazoj ĉi tiujn du demandojn: 1<sup>a</sup>. Kiun konsilon vi plej donas al viaj interparolantoj? 2<sup>a</sup>. Ĉu vi taksas vin saĝulo?

— Tre facilaj demandoj. 1<sup>a</sup>. Konu vin mem; 2<sup>a</sup>. Mi scias nur, ke nenion mi scias.

**José Mauro Progiante**

## Daŭrigo de la paĝo 13: Recenze

Kaj tamen ĉiuj estas homoj, ĉiuj povas aprezi falaflojn kaj ankaŭ macojn.

Ankaŭ Svedujo elstaras kiel rolulo en la riĉenhava romano, kiu montras la tragikan panoramon de homa malracieco. Ankaŭ solidareco ekzistas en la mondo, tiel ke homoj kunsentas kun la aliulaj suferoj kaj pretas helpi. Venas momento, kiam la protagonista junulino eksentas deziron fari ion por helpi bezonantojn. Oni ne supozu, ke ĉio solviĝos en la mondo pere de la agado de politikistoj. Tute ne. Ĉiu civitano, ĉiu homo kun minimuma hom-eco, povas helpi.

Ni ĉiuj estas formiketoj en la granda mondoformikejo: nigraj, grizaj, brunaj, ruĝaj formikoj, sed nur formikoj. Por plibonigi la mondon, la vojo estas tiu de kunlaborado, neniam de batalado de formiko kontraŭ formiko, nur por la malsameco de la formika koloro.

Sten Johansson donacis al nia literaturo unu plian bonegas romanon. Belstilan, riĉenhavan, precipe pensigan. Jen aŭtoro, kiu fariĝas moderna klasikulo en nia Esperanta kulturo.

**(P.S.Viana)**



# Lingvaj Respondoj

## de Francisco Wechsler



### Demando

Veterana Esperantisto verkis tekston, en kiun li enmetis la kunmetitan vorton *oniloke*, en la senco *en la loko de oni, en loko de nedifinitaj personoj*. Ĉu tio estas ĝusta? Ĝis kiu punkto oni estas libera krei kunmetaĵojn en Esperanto?”

### Respondo

La baza regulo por formado de kunmetitaj vortoj estas la 11-a de *Fundamenta Gramatiko*, nome: *Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj*. [Laŭ la esperantlingva versio en *Fundamenta Krestomatio*.]

La verko *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (versio 15.4) diskutas detale vortfaradon surbaze de la fundamenta regulo. La ekzemplo menciita en la demando estas kunmeto de du radikoj (*oni* kaj *lok-*), kiun PMEG nomas *kombino*. Ĝi nomas ĉefelemen-  
to la radikon *lok-*, kaj *preciziga antaŭ-  
elemento* la radikon *oni*. Laŭ tiu verko

la preciziga antaŭelemento povas esti substantivo, adjektivo, adverbo, verbo, numeralo, prepozicio. Ĝi mencias nenium ekzemplon, kie pronomo (*oni*) rolas kiel preciziga antaŭelemento.

Posed-adjektivoj, derivitaj el pronomoj per la almeto de la finaĵo *-a*, ja estas uzeblaj kaj uzataj en vortfarado; ekzemple, *miaopinie*, *siavice*, *niampe* kaj *oniloke* estas tute normalaj kombinoj. Kontraste, tiaj formoj, kiel *miopinie*, *sivice*, *nitempe* kaj *oniloke* ne havas signifon klare difineblan. Simile, la signifo de *oniloka* ne ŝajnas al mi sufiĉe klara kaj komprenebla. Konklude, mi ne rekomendas tiajn formojn, kvankam, laŭ strikte gramatika vidpunkto, ili estas ĝustaj.

## Zamenhofa balado

de Kálmán KALOCSAY

(Verkita en 1937, afiŝita en la listo  
"kreado" de Blazio VAHA 2002.12.13)

Kiam li antaŭ kvindek jaroj  
L' Unuan Libron ekkaresis,  
Kaj inter liaj okulharoj  
Grandguta ĝojo-larmo mezis,  
La Verk' por kiu li elspezis  
Junaĝajn ĝojojn, staris brile  
Ekkanti al li tre necesis  
"Ho kor', ne batu maltrankvile!"

Kaj kiam, malgraŭ ĉiuj baroj,  
L' afero, kreskis kaj progresis,  
Kaj la entuziasmaj aroj  
Adeptaj en Bulonj' kongresis  
Mirakla sento lin impresis  
Kaj krei volis li jubile  
(Sed gorgŝufoko ne permesis)  
"Ho kor', ne batu maltrankvile!"

Kaj en la tempo de amaroj,  
Kiam la mondo murd-ekscesis,  
El homa sango kreskis maroj,  
Kaj jam esperoj ĉiuj ĉesis  
Al koro, kiu tiel pezis  
En brust' spiranta malfacile,  
La lastan peton li adresis  
"Ho kor', ne batu maltrankvile!"

Majstro! La mondo refrenezis,  
Kaj nun alvokas ni simile,  
Ĉar nin kruelaj vundoj lezis  
"Ho kor', ne batu maltrankvile!"

\* \* \*

# Balada de Zamenhof

de K. Kalocsay

Ao segurar, cinqüenta anos atrás,  
O Unua Libro com docilidade  
E entre os cílios dos seus olhos jaz  
Uma gota de prazer e de saudade,  
A Obra, para a qual da mocidade  
Doou todo o prazer, pra que cintile  
Agora, de cantar vem a vontade:  
“Ho, kor’, ne batu maltrankvile!”

E quando a Causa cresce a todo gás  
Mesmo com toda a adversidade,  
Com entusiasmo adeptos da paz  
Juntam-se todos em uma só cidade —  
Vem algo milagroso que o invade,  
O nó no peito faz com que vacile,  
O sentimento pede-lhe que brade:  
“Ho, kor’, ne batu maltrankvile!”

E no tempo das guerras mundiais  
Em que se assassinava sem piedade  
De sangue humano um oceano se faz  
E já toda a esperança se evade —  
Seu peito bate com intranqüilidade  
O aperto faz com que o ar sibile.  
E um rogo derradeiro à Divindade:  
“Ho, kor’, ne batu maltrankvile!”

Ó Mestre! O mundo volta à  
/insanidade,  
Repetem-se as loucuras em desfile,  
Só resta repetir: Por caridade,  
“Ho, kor’, ne batu maltrankvile!”

**Tradução: Cícero Soares**



# Kurema esperantistino

Tânia Paixão

*Kie kaj kiam vi naskiĝis? Kiu estas via profesio? Kiam vi eklernis Esperanton?*

Mi naskiĝis en la profunda kamparo de la brazila ŝtato Pernambuco, en la urbo Caruaru, je la 13-a de junio 1952. Dum 42 jaroj mi laboris kiel odontologiisto. En la jaro 2007 mi ekkonis Esperanton en Brazila Spiritisma Federacio, kaj mi komencis mian lernadon kun D-ro Elmir Santos. Poste, mi venis en la Kulturan Kooperativon de Esperantistoj (en Rio), kaj mi studis kun Jair Salles.

*Vi estas konata kiel aktoro, kiu prezentas la figuron de “Carlitos” (Charlie Chaplin). Kiel vi ekhavis tiun ideon, kaj kie vi jam prezentiĝis tiel?*

Mi ĉiam admiris Charles Chaplin, al mi plaĉas la teatra lingvo. Unu tagon mi rigardis min sur spegulo, almetis ĉapelon, ŝminkis lipharetojn, prenis la blovharmonikon kaj klopodis ludi “Smile” en basa tono, mi sendis ĝin al sam-ideanino Rosana Caraméz, kaj ŝi

stimulis min al prezento al la Esperantista publiko. En alia okazo, mi renkontis Dirce Sales en kulturcentro de Banco do Brasil, kaj ni interparolis pri arto, kaj ni komencis grandan duopan kunlaboron, kun amikeco kaj agado favore al la movado. En la jaro 2012, ni prezentis “Carlitos” en la urbo Teresópolis, en Ŝtata Renkonto de Esperantistoj; kaj tiam eksciis, ke Charles Chaplin uzis la lingvon Esperanto en unu el siaj filmoj, kaj tiu fakto ege motivis min.

Ni prezentis la homfiguron “Carlitos” en pluraj skeĉoj, en Regionaj Renkontoj, Landaj Kongresoj kaj en la Universala Kongreso en Bonaero, Argentino. Tiam mi prezentiĝis kun la sonado de “Smile”, en traduko de P. Viana kaj kantata de Dirce Sales.

Nia kara homfiguro klopodas allogi la Esperantistan publikon kaj simpatiantojn sur placoj, librofoiroj, bienaloj de libroj.


*Ankaŭ kiel aktoro, kune kun Dirce Sales, vi jam prezentis skeĉojn plurfoje. Kio kondukis vin al teatra agado?*

Dirce Sales, entuziasma pri Esperanto kaj pri la arto de teatro kaj didaktiko, kondukis min sur tiu magia vojo, sur kiu ni amuziĝas kaj ĉiam kreas nov-aĵojn, nome novajn skeĉojn, en Esperanto kaj en la portugala lingvo, en Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Rio), kaj en kongresoj, ŝtataj kaj tutlandaj.

*Lastatempe vi famiĝis kiel kuranto. Eble vi estas la sola Esperantistino en Brazilo, kiu praktikas tiun atletan agadon. Kio motivis vin al longaj kuradoj?*

Mi ne estas fama, nek pretendas tion, mi diskonigas la lingvon Esperanto dum la kuradoj kaj en amaskomunikiloj, atentigante tiujn, kiuj estas Esperantistoj, ke ili same agadu en la kadro de siaj sportoj, kaj tiujn, kiuj ne scias, kio estas Esperanto, kaj ekscivolas kaj interesiĝas. Diskonigado estas ia semo ĵetita, eble ĝermonta.

Min instigis al kurado la serĉado de bonfarto korpa kaj mensa, ĉar mi estis iom malĝoja, pro la foresto de gefiloj. Tiu korpekzerco proponas al ni plurajn bonfarojn. Mi komencis je kurado de 5 kilometroj, sed la instruo estas: kiu kuras 5, tiu kuros 10, kaj povos kuri 15



Tânia Paixão surpodie

aŭ 21 kilometrojn. Tio dependas de trejnado, kaj tion mi faras. Kompreneble, unu fojon en ĉiu jaro mi submetiĝas al ekzamenoj, kiuj montras, ke mi plu rajtas kuradi. Kaj la iama ostoporozo malaperis...

*Vi partoprenas ankaŭ en internaciaj E-eventoj. Bv informi iom pri tio.*

En la jaro 2014, okaze de la internacia kongreso en Bonaero, en la momento de artaj prezentoj, mi surscenigis la figuron de “Carlitos”.

En 2019, en Lahti, Finnlando, mi prezentis tekston de Chaplin en la arta programo.

Kune kun Dirce Sales, mi partoprenis kelkfoje en la projekto de Ĉina Radio “Teo kaj Amo”, inkluzive per nelonga filmeto, kiu estis montrita en internacia kongreso.

# Krea Novigo: La Futuro de Tutmonda Mondovizio kaj Etiko

Sencomanko estas por ni defio, minaco, instigo. Homa cerbo tute malŝatas ne kompreni strangan fenomenon. Antaŭ nekonata situacio traserĉas ĝi memoraĵojn cele eltrovi en pasinta sperto indicojn, spurojn, evidentojn pri regulo, modelo, ŝablono, minimume rekonebla. Alkutimiĝintaj al specifaj kaj sektoraj krizoj, homoj preskaŭ freneziĝas antaŭ tiu nova-speca, tutmonda, planeda krizo, nome la pandemio kaŭzita de nevidebla malamiko, mutacianta viruso mortiganta multajn homojn. Kun ironia demokratio, ĝi infektas personojn el diversaj sociaj kondiĉoj, kredoj, ideologioj en landoj ĉu riĉaj kaj povaj, ĉu historie malriĉigitaj. Publika aŭ ne, sansistemoj simple kolapsas antaŭ niaj senpovaj kaj surprizaj okuloj.

Katastrofo, tragedio, torturo estas ripetataj vortoj en gazetaro. Aliaj vortoj aperas pli modeste, certe ĉar ili ne vendas ĵurnalojn, ne donas al televidkanaloj grandan aŭdiencon. Ekzem-

ple, kio troveblas pri transiro al nova-speca civiliza modelo? Pensi tiel signifas akcepti kontuzan fiaskon de ĉiu modelo ĝis nun spertita de ĉiu lando, ĉiu popolo, ĉiu nacio. Kontraŭ la damaĝoj kaŭzataj de tiu nova Kovim-19 estas tute senefikaj pezaj armiloj, potencaj bomboj, danĝeraj kanonoj. Krom la kolapso de sansistemoj, ankaŭ la globa, interligita, kompleksa ekonomia sistemo bankrotas kaj minacas la homan vivon. Aliflanke, laŭdire, krizo ĉiam estas defio kaj oportuno. Aŭ ni ĉiuj kune lernos la krudan lecionon kaj leviĝos el cindroj aŭ ni ĉiuj pereos pro orgojlo kaj ignoro. Tio validas ankaŭ pri la ĵusa klimata katastrofo okazinta en la brazila subŝtato Suda Riogrando. Nia estos la elekto. Nia estas la oportuno – tiu selĉevalo preta por rajdado – kiu onidire nur unufoje paŝas antaŭ ni. Kion ni faros, kiun vojon popoloj kaj ŝtatestroj fine elektos? Tio ne estas simpla ludo, ĉar eble nia plej malfacila tasko estas ena, memstara ŝanĝo.

Famas la frazo de Albert Einstein: “Kia mondo estas tia, kie estas pli facile rompi la nukleon de atomo ol antaŭ-juĝon.” Kion atendi kaj kiom esperi?

Espero certe venos ne el la sama ofta pensomaniero, el senlima konsumismo, el individuismo, el senbrida naturekspluatado. Materiismo mem nin kondukis al monda ĥaoso. Materio estas videbla, sentebla, iel tuŝebla parto de la vivo. Arto, kulturo, eĉ bonfarto kaj sano, tamen, estas la nemateria aspekto de la videbla mondo. La koncepto pri sano evoluis. Hodiaŭ pli ampleksa koncepto diras, ke sano estas difinita de Tutmonda Sana Organizo kiel tio rilate al la stato de kompleta fizika, mensa kaj socia bonfarto de persono kaj ne nur la antaŭa kaj limigita vizio de malesto de malsaneco aŭ morbo. Krom tio certe indas inkluzivi ekologiajn kaj spiritualajn aspektojn.

Espero venos pli probable el nia kreemo, novigo, imagopovo ol el nia racia cerbo apartigita el nia koro. Aŭ ni kune unue ŝanĝos nin mem, nian mondovizion, kaj sekve ni ŝanĝos la mondon, aŭ nenio efektive ŝanĝiĝos, kaj nia devojiĝo estos refoje torturiga, katastrofa, tragedia. Denove nin inspiru vortoj de Einstein: “Neniu problemo povas esti solvita de la sama kons-



cia stato kiu ĝin kreis. Estas bezonate iri pli longe.” Ekstermoda, tamen esplorinda, estas, *mutatis mutandis*, kelkaj principoj formulitaj de L. L. Zamenhof, nome *homaranismo*<sup>(\*)</sup>. Kompreneble, kiam nia mondovizio kaj imunosistemo iĝos pli sana, do jam ni liberiĝos el la enkatenigo de *ismoj*. Alivorte, ne temas pri blinda adopto de kredosistemo deviga kaj ekstere devena, tute ne. Male, ene de ĉiu pacigita koro espereble burĝonos la delikata floro de novaspeca, profunda, egalrajteca mondovizio, ne kiel filozofio, sed kiel nesuspektebla elkora etiko, unika, supera al ĉio.

### **Paulo P Nascentes**

Profesoro, poeto, preleganto,  
terapeŭto.

---

(\*) <https://eo.wikipedia.org/wiki/Homaranismo>



# Rutino

Ĉu vi ŝatas vian rutinon?

Fernando Amengual Del Campo, Direktoro de “Hojanoticias”, en Rotary Club San Bernardo – Ĉilio, klarigas nin pri Rutino:

“Rutino rezultas de praktikado, kiu laŭlonge de tempo disvolviĝas en maniero preskaŭ aŭtomata, sen bezono de rezonoj”. “Ekzemploj pri rutino: “Ne volas labori en oficejo: mi malamas la rutinon”. “Por mia patrino, la rutino taŭgas ĉar ĝi okazigas sekuron kaj trankvilecon.” “Vere estas ke la rutino

tedigas min”. “Estas en mia rutino ĉeesti ĉiusemajne en mia klubo”. “La rutino de la kunvenoj malkreskigas mian entuziasmon por Rotary”.

La supraj ekzemploj montras paradoksan rigardon pri la signifo, kiun ni donas al rutino. Por kelkaj aferoj ĝi estas bona, kaj por aliaj malbona. En kelkaj estas espero de plibonaj aferoj kiuj faciligas la vivon, kaj, en aliaj estas tede plenumi ĉagrenajn aferojn.”

“Simila afero okazas en la programo de la semajnaj kunvenoj, se ili ne estas preparitaj je la konvena anticipo.” “Se ili transformiĝas en rutinajn kunvenojn kiuj nur sukcesas malstimuli la asociojn, kaj esti granda kialo de la rezignado de multaj el ili.”

Ĉu tiu ĉi supra bildo estas okazinta en niaj Esperantaj Klubo/Grupoj? Kiel ni traktas la rutinon en niaj grupoj? Ŝajnas al mi ke la bona rutino estas alvoki la esperantistojn el niaj grupoj por krei, skribi, traduki, prelegi, ktp.

*(Daŭrigota sekvapaĝe)*





**Hotelo Ibis** de Paulínia gastigos la 16-an E-kongreson de la ŝtato San-Paŭlo en la tagoj 14-15 sep 2024

## Daŭrigo de la antaŭa paĝo: Rutino

Tio estas la neceso nune: produkti por firmigi la movadon kaj reteni la esperantistojn en Esperantujo.

Ni estas Esperantistoj por uzi la lingvon en la korespondado, ĉe la gamikoj, foje profesie, foje por vojaĝi, foje por legi eksterlandajn beletraĵojn, foje por instrui, foje por ellerni, por vidi kaj senti la mondon ekstere la eta skatolo de la nunaj moroj.

La mondo bezonas Esperanton,

bezonas Homaranismon, kaj kvankam neante Spiritismon, neniam ĝi estis tiel serĉata kiel nun. Kiu laboros por disvastigi tiujn ĉi trezorojn? Ĉu vi? Ĉu mi? Certe ni ĉiuj! Esperantujo devas helpi la mondon!

S-ro Fernando Amengual Del Campo finas sian artikolon; mi invitas vin pripensi la ideojn jam supre skribitajn, kiuj taŭgas por rigardi internen.

**João Otávio Veiga Rodrigues**

# Libroj lanĉotaj septembre en Paulínia



**Tri noveloj**  
de Graciliano Ramos  
Tradukis Paulo S. Viana



**Kurba**  
kaj aliaj noveloj  
12 noveloj originale  
verkitaj en Esperanto



**Katarina, la eta**  
Plia infanlibro verkita  
de Paulo S. Viana kaj ilustrita  
de Anna Lobo de Carvalho